

PENSEO

N-ro 313

nov. / 2017

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 28-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



neĝo

la neĝo de julio
 neniel rilatas al niaj miskulpigiteco.
 la flama koro
 aspiras tutan blankon inter tero kaj ĉielo.
 tro multe da konfuzo
 ne forviŝeblas per pluvego.
 mi do revas ke la suno akra glaciigu
 kaj la sonĝo flugu kun la sesangulaj
 neĝpecetoj.
 la somato mallibera glitos al la luno
 kaj eksentas ardon kaj malvarmon.
 la distanco al la fino de la mondo estas
 nulo.

2009-7-21

pluvo

la densaj ŝnuroj
 ligas la teron kaj ĉielon.
 per ili mia suprengrimpado
 ĉiam finiĝas je falglito.
 kies kajto estas
 la nub-amaso tro alta?
 ĉielarko,
 ponto fantazia,
 estas diabla ombro el larmoj.



2009-7-21

nebululo

la rava fluaĵo
 estas pli firma ol ŝtalo.
 la emocio nedistranĉita obsedas la korpon.
 matenruĝo malfrue veninta
 falas en fosajon.
 kiam mi venas rajdante sur la suno
 la ĉefurbo estas vana.
 ĝi estas neforviŝebla
 nekaptebla.
 vanta estas la vivdaŭro.
 nepovante ĉasi nubon,
 rezignacie
 mi gapas al tio ke aŭtoj kaj boatoj interkisas.

2009-7-21

monto

la tiel nomata firmeco
 venas el sieĝo kaj premado.
 ĉio ŝanĝiĝas en la mondo.
 farante nenion, la monto nur rigardas
 velojn preterpasi.
 atendante kun senpacienco,
 ĝi ne povas movi la piedojn.
 la nuboj en man-etendo
 estas zorgo nur de vento.
 alvoko
 ŝvebfalas ĉe la horizonto.
 eĥo de sia voĉo.



2009-7-22

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Ĉu mi, poeto?

Mi ne scias, kiom da voĉoj mi gardas;
jen pilgrimanta polifonio
regas variojn pri la sama temo:
nekompreneblan simfonion de l' vivo.

Kaj poemojn la voĉoj teksadas
per larmoj kaj ridoj de l' mondo,
sed en silento ili kuŝas multfoje
sub la senhelpa rigard' de l' poeto...
Tiam la knaba donkiĥota mio
la scenejon eniras,
kaj blinde verkas poemon.

Juiz de Fora, 07/09/2017.

Dankon, SPV!



Paulo Sergio Viana

Poeme liaj belaj prozoj sonas!
Angelo klera kaj ĉiam helpema,
Unanima voĉ' al li gratulas.
Literaturon, arton kaj sciencan
O fertas liaj verkoj ĉiusemajne.

Sin dediĉas Paŭlo al kara lingvo
Esperanto, sia kora pasio,
Revigligante la verdan movadon.
Grandanima samideano nia,
Idealisto, senlace laborema,
Okupiĝas pri la sankta afero.

Vivu ĉiam la 8-a de Septembro!
Internaciul' naskiĝdatrevenas!
Afbla majstro, poeto sentema,

N obla homo: jen vera ĝentlemano!
A miko homama, Dio vin benu!

Plej admire, danke kaj amike,

Juiz de Fora, 08/09/2017.

Paŭlo Silas (Brazilo)



EKSTERLEĜAJ FLOROJ

Kion ĉi tiu poemo povas fari sen revolvero?
Kugloj forpafiĝas apud oreloj.
Ankoraŭ ne alvenis la tempo morti.
La poemo portis al sieĝantoj
homon kiel garantion.
Kio estas la Tero sen vivo?
Nenio, krom nulo,
bulo girante sen celo.
Ĝi tenas nin kiel ostaĝojn.
Ankoraŭ ne alvenis la velkaĝo.
Floroj insistas burĝoni sur la ŝoseanguloj de
tiu ĉi urbo
centojn kaj milojn da kilometroj for de
Salvadoro, Rio-de-Ĵanejro kaj Braziljo.
Kiu estas la ĉefurbo de Brazilo?
Ĉi tiu lando havas nek umbilikon nek buŝon.
Brazilaj haŭtoj plenumas fotosintezon.
Se ĉi tiu poemo havus buŝon, ĝi estus kanibalo
kaj vorus la unuan kiu albordiĝus ĉi-poemen.
La stomako ne digestus la semojn.
El la merdo de ĉi tiu nacio, nova arbarego
kreiĝus.
Kaj el la urino, nova rivero fluus.
Bruu elokvente ĉiuj aŭtoj kun hupoj.
Dampu la kulpojn.
Mi ĵuras, ke estas vero: floroj ne malaperis.
Ili postvivis
kaj, silentigitaj de la delira tagmeza hasto,
organizas insurekcion por rompi la asfaltan.
Ankoraŭ ne alvenis la brila epoko de plena
justeco.
Homoj detruas homojn.

Pliaj krimoj atendotos morgaŭ.
 Se ĉi tiu poemo havus komplikon,
 ĝi petus ekzilon en Marso.
 La tempopaso,
 temp-amaso sen signifo por la historio de la
 planedo,
 stumblis ĉe kokino kiu trairis la Laktan Vojon.
 Oni vendas sunsistemon por riĉigi la
 universokason.
 Kraŝon
 de du aŭtoj aŭ de du planedoj ne enkalkulas
 la analoj de la primara ekekzisto.
 Ni konsultu historiolibrojn por certiĝi,
 ĉu la epilogo komenciĝas hodiaŭ.

la 2-an de majo 2017

Mori (Usono)



AFORISMe(25)

Abelo
 ĝuas vivon
 kun abelo,
 homo kun homo
 je sia nivelo.

Homo
 por kaŝi siajn makulojn
 prijuĝas aliajn ulojn.

Ridu ,
 la mondo kun vi ridas,
 ploru ,
 la mondo vin ne vidas.

Homo
 kun riĉa sinteno
 diferencas de
 riĉa persono!

Almozulo vera
 estas riĉa persono
 kun malriĉa sinteno.

Valoron de la homo
 sur la alta posteno
 montras lia konduto
 kun senpova persono.

Vivo
 sen libero
 estas kiel vivo
 en la infero

Rideto
 sur vizaĝo
 estas signo de
 saĝo.

Tiu, kiu ĝuas
 O kiel infano
 estas feliĉa homarano.

Por pli bone scii
 pri ajna persono
 provu lin per mono,
 kaj alta posteno.

Vivo
 estas kiel fajro
 kies flamo kreskas
 per la blovoj de ĝojo
 kaj amo.

Etmensa persono
 sur la alta posteno
 kondutas kiel hieno

Kie neniu estas super-riĉa
 kaj neniu estas malriĉa,
 tie ĉiu homo
 povas esti feliĉa.

Saĝul'
 ĝuas la vivon
 modeste
 kaj honeste.

 Ĉiuj finfine kuŝas
 humile en la tombo
 do estas ja stulte
 kondukti kun aplombo.

 Hontinde estas
 en tria jarmilo,
 homo solvas konfliktojn
 per armilo.

 Mil laboristoj vivu
 mizere kaj malriĉe
 por ke unu riĉulo
 ĝuu vivon feliĉe.

 Nur tiu povas esti
 je l' servo de homaro
 kies koro grandas
 kiel granda maro.

 Mizeras
 vivo de l' hom'
 kiu vivas ĝis l' fino
 sen konscie decidi
 pri sia destino.

 Oni povas decidi
 ĉu vivi parazite
 kiel kulo
 aŭ sklave kiel mulo
 aŭ vivi riĉe kaj feliĉe
 kiel memfida ulo.

 Maljusta leĝo
 favore al despota reĝo
 estas ja malobeinda
 leĝo.

 Se mankus lakeoj
 kaj idiotoj
 per si mem
 defalus despotoj.

Kio estas homo
 sen moralo
 en la moderna
 mondo-ĝangalo?

Hans-Georg Kaiser (Germanujo)



Pri mi

Mi estas, laŭ mia nomo, Cezar,
 sed dubas pri mi mem dum la far'.
 Mi naĝis tra merdo, tra malver'.
 Mi cerbumis, ŝvebis for de l' ter'.
 El kapo mia fluas torent',
 ja belo eĉ, sed ankaŭ nur vent'.

Pro embaraso mi verkis pri la mort'
 kaj ĉeokaze eĉ kun tuta fort'.
 Se maroj saltas brue kun impeto,
 mi sentas tuj, ne estas mi profeto!
 Poemojn miajn gvidas fantazi'.
 Sed certe ofte ankaŭ iluzi'.

Mi tamen estas kun ĝojo herezulo
 kaj provokanto dum postulo.
 Pro historio mi kun verv' prikantis,
 ridindulinojn, ĉar mi tro vantis.
 Mokulo mi estas, jes ja – kaj poet',
 fantomribelulo de l' interret'.

Wally Du Temple (Kanado)



Panja poeto foje diris

Fekunda penso el mi iris
 Fingretoj, oreletoj paraj?
 Akuŝintencoj miaj karaj?
 Aŭ ĝi naskito antaŭtempa?
 Nudvundeblas sub neona zum'
 En kovilo sub elektra lum'?
 Muro baras min de mia bebo —
 De vivanta mia haŭtfalduleto.
 Nun manlevas ĝin la kuracist'.
 Vangon premas mi en la persist'

Al vitra mur' kiu baras min.
 Oh, deziru mi plue moldi ĝin!
 Sopiru aldoni vortojn du?
 Ne, vivantan idon akceptu!
 Estas la mia, mi fieru!

tapiŝon por ĝi.

Piraj folioj –
 bruligita de la sun'
 aŭtuna fajro.

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Aroma rozo
 en fraŭlina ĝardeno.
 La kardoj gvatas.



Flustro de l' herbo
 laŭ la matena pado.
 La nimfa ploro.



Kato kaj hund o
 tutsolaj en la korto.
 Hejm' detruita.



Ripo de Adam'.
 Kaj Dia preĝa beno.
 Li kaj Ŝi kune.

Elena Popova (Bulgario)



Riĉa aŭtuno
 kolorojn diŝjetas.
 Ĝojo dumvoje.

Senhoma maro.
 Grak' de kontentaj mevoj.
 Tristaj memoroj.

Kaŝtan en floro –
 espero dum oktobro.
 La vento ridas.

La vento pelas
 la aŭtunon. Ĝi sternas

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKDUA

La ĉielo kaj la tero

§12-05

Kiam la reĝo Yao faris inspekton en la regiono Hua, iu landlima gardisto tiea diris:

“Ho, saĝulo! Permesu al mi esprimi al vi miajn bondezirojn! Mi deziras al vi longan vivon.”

“Dankon, sed mi ne bezonas tion,” diris la reĝo Yao.

“Mi deziras al vi abundan riĉecon,” daŭrigis la gardisto.

“Dankon, sed mi ne bezonas tion,” diris Yao.

“Kaj multajn filojn,” aldonis la gardisto.

“Dankon, sed mi ne bezonas tion,” diris Yao.

“Longa vivdaŭro, abunda riĉeco kaj multaj filoj ja estas avide dezirataj de ĉiuj homoj. Vi estas la sola, kiu ilin ne bezonas. Kial do?” demandis la gardisto.

“Tiu, kiu havas multajn filojn,” respondis Yao, “havas multajn zorgojn; tiu, kiu posedas abundajn riĉaĵojn, havas multajn ĉagrenojn; tiu, kiu vivas en aĝo tro maljuna, kaŭzas al si malagrablojn. Tiuj ĉi tri maltrankviloj malhelpas al homoj kulturi sian virton. Jen kial mi rifuzas viajn bondezirojn.”

“Komence,” diris la gardisto, “mi konsideris vin kiel saĝulon, sed nun mi pensas, ke vi estas nur ordinara noblulo. Sendante la homojn al la mondo, la

Ĉielo destinas por ĉiu el ili apartan devon. Se vi havos multajn filojn kaj ili havos ĉiu sian plenumendan devon, kiajn zorgojn do vi tiam havos? Se vi havos abundajn riĉaĵojn kaj lasos al la aliaj dividi ilin kun vi, kiajn ĉagrenojn do vi tiam havos? La saĝulo trovas plej bona la lokon, kie li loĝas; li ne estas elektema pri siaj nutraĵoj; li foriras lasante nenian postsignojn kiel la birdoj flugantaj en la aero. Kiam la Taŭo regas en la mondo, li partoprenas en la prospero kun ĉiuj estaĵoj; kiam malordo regas en la mondo, li retiriĝas en senokupecon kaj kulturis sian virton. Kiam li vivas ĝis la aĝo de mil jaroj, laca de la vivo, li forlasos la mondon kaj supreniros al la ĉielo. Kiel senmortulo li rajdos sur blanka nubo kaj atingos la landon de la Ĉiela Reĝo. Tiam la tri maltrankviloj malaperos de li, kaj li estos libera de ĉia malfeliĉo. Kiajn malagrablaĵojn do li povas kaŭzi al si?”

Fininte la diron, la landlima gardisto sin turnis kaj foriris. La reĝo Yao kuratingis lin kaj diris:

“Permesu al mi meti al vi ankoraŭ kelkajn demandojn.”

“For de mi!” diris la gardisto.

§12-06

Kiam la reĝo Yao regis super la mondo, Bocheng Zigao ricevis la titolon princo. Kiam la reĝo Yao transdonis la tronon al la reĝo Shun kaj la reĝo Shun transdonis la tronon al la reĝo Yu, Bocheng Zigao ekŝiĝis el sia posteno kaj sin okupis je terkulturado. Kiam la reĝo Yu iris viziti lin, tiu estis laboranta sur la kampo. Li rapide alpaŝis al li kaj staris tie, dirante:

“Majstro, kiam la reĝo Yao regis super la mondo, vi ricevis la titolon princo. Kiam la reĝo Yao transdonis la tronon al la reĝo Shun kaj poste la reĝo Shun transdonis la tronon al mi, vi ekŝiĝis el via posteno kaj vin okupis je la terkulturado. Ĉu mi povus demandi, kial vi faris la ekŝiĝon?”

“Kiam la reĝo Yao regis super la mondo,” respondis Bocheng Zigao, “la popolo laboris diligente sen ricevi rekompencan kaj time respektis la aŭtoritatecon sen esti minacata per puno. Nuntempe vi rekompencas kaj punas, sed la popolo ne estas plu humana. La virto estas en dekadencado kaj la punaj leĝoj estas starigitaj. La malordoj, kiuj daŭros ĝis la

estontaj epokoj, komenciĝis ekde vi. Kial do vi ne tuj foriru de mi? Ne interrompu mian laboron.” Ĉe tio li rekomencis sian plugadon kaj ne plu donis atenton al la reĝo Yu.

§12-07

En la komenco regis nenieco en la mondo. Tiam ekzistis neniaj estaĵoj, nek nomoj. El la nenieco estiĝis la praa Unu, alinome la Taŭo, kiu havis nenan materialan formon. El la praa Unu venis la estaĵoj, el kiuj ĉiu ricevis tion, kio estas nomata ĝia propra “virto”. Antaŭ ol la estaĵoj prenis siajn respektivajn formojn, jam ekzistis en ili la distingo de la jino kaj la jango, kiuj estis nedisigeblaj unu de la alia. Tio estas nomata la “destino”. La estaĵoj ekzistiĝis en la procezo de la intermiksiĝo de la jino kaj la jango kaj ricevis ĉiu sian apartan korpon, kiu estas nomata ĝia “formo”. La fizika formo konservas en si la spiriton. Ĉiu el la spiritoj kun sia formo havas sian karakterizaĵon, kiu estas nomata la “denaska naturo”. Kun plua kulturigo la denaska naturo revenas al la origina virto; atinginte sian perfektecon la virto sin identigas kun la origino de la universo. La identiĝo kun la origino de la universo estas malpleno. La malpleno estas ĉioampleksa grandeco. Tiukaze la homa parolo harmoniiĝas kun la kantado de la birdoj. Harmoniiĝante kun la kantado de la birdoj, la homoj harmoniiĝas kun la ĉielo kaj la tero. La harmoniiĝo estas tiel perfekta, ke la homoj estas kvazaŭ stultaj aŭ obskurkapaj. Tio estas nomata la “profunda virto”, kiu perfekte konformas al la natura evoluo de la estaĵoj.



Elĉinigiĝis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Aŭtuna pluvo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

En aŭtun'
pluvo kun tiktak'
falas en friska nebul'
jen sub venteta atak'
de sursura krak'.

Silkeca
pluv' en svaga fum'
verŝas gutojn sur teron
varman en somer-brakum'
de akvo-konsum'.

La tero
malseka plenas
je kotaj akvaj flakoj.
Dum pluv-draŝo alvenas,
la floroj svenas.

Insektoj
sin kaŝas en tru'
por eviti pluvbaton
kaj atendi sen ĉirp-bru'
tempon de sun-ĝu'.

La rojo
torentas pro ŝvel'
kun falintajn foliojn,
frapas bordojn per ribel'
de akv-flua pel'.

Arbare
birdoj en silent'
sin per malsekaj plumoj
volvas en pluvbata vent'

kun panika sent'.

Endome
mi kun plezuro
legas romanon novan,
surda al pluv-murmuro
kaj vent-ululo.

Yanke (Ĉinujo)

Soleco

—laŭ ĉinesko Sopiral-sudo*

Kelkfoje
soleco estas
libro en miaj manoj
kiu min ja molestas
kaj min infestas.

Kelkfoje
mopso ŝajnas ĝi
kun la svinganta vosto
amuze ludas kun mi
jen per emoci'.

Kelkfoje
ĝia kara am'
karesas mian koron
kiel konsola balzam'
efemera jam.

Kelkfoje
kiel aŭtun-briz'
freŝigas mian menson
en konfuz' per vola kis'
sen vorta aviz'.

Ĉiame
en ĝia brakum'
mi nestas obeeme
en la komforta kostum'
sub dormema zum'.

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma

poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo
xa,xa,a (x=senrima).

Yanke (Ĉinujo)

Paseo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Jam
forpasis l' amara am'
ve, kiel
estingita flam'.

Ne
mi devus ja al pase'
sindone
alkroĉiĝi tre.

Mi
ofte drinkas ĝis ebri'
ĉiame
en memorglaci'.

Vin'
malrapide ronĝas min
ĝisoste
eble ĝis vivfin'.


Per
ĉagreno en malesper'
mi velkas
en ama mizer'.

Ve,
min ĝeni mi devus ne
ĉagrene
per tia ide'.

For
el la ombro de malglor'
min savos
mi jen en ĉi hor'.

Al

pase' mi diru sen pal'
adiaŭ
per vina pokal'.



**Dekses-Silabo: ĉina fiksoforma poemo el kvar
versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa
(x=senrima)

Ĥristina Kozlovskaja

Fabelo pri la Nigra Bagnulo

Unu tagon viro kuŝiĝis sur la varman herbon en la kampo por ripozi. Tiel li kuŝadis kaj admiris la pejzaĝon, kaj ĝojis pri la varma somero. Ĉirkaŭe insektoj zumadis, kaj la suno agrable varmigis lian haŭton. Estis kviete kaj bone en la animo de la viro, kaj li jam sentis dormemon, kiam li subite ekaŭdis strangajn sonojn. Li retrorigardis — neniu estis, li leviĝis, sed tamen neniun vidis. Li kuŝiĝis sur la teron denove kaj aŭdis ion denove. La viro fiksaŭskultis, ĝis li komprenis, ke la sonoj venis ne de ie ajn, sed de sube, de sub la tero. Li alpremis sian oreilon al la varma herbo kaj senmoviĝis. Do, io frapas kaj batas tie en la profundo de la tero, sed ne nur frapas, sed ankaŭ ĝemas, kaj tiel peze, ke la koro disŝiriĝas je pecoj, kaj larmoj plenigas la okulojn. Ankaŭ la viro frapis la teron per sia pugno, kaj tiel forte, kiel li nur povis.

— Kiu vi estas kaj kiel vi trafis tien? — la viro kriis al la tero, sed la tero silentis kvazaŭ muta. — Kiu vi estas? — li ripetis.

— Mi estas la Nigra Bagnulo — aŭdiĝis el sub la tero. Dum mia tuta vivo mi laboras peze ĉi tie en mallibero, mi ne vidas la veran mondon, mi ne scias aŭ ne memoras, kiel aspektas tiu vera mondo. Mia

haŭto nigriĝis, mia koro malmoliĝis, mia dorso fleksiĝis.

La viro kompatis la Nigran Bagnulon, kaj tiel kompatis, ke li ekploris, kaŝante siajn larmojn en la herbo.

— Ne ĉagrenu, Nigra Bagnulo — la viro kriis denove — Mi liberigos vin en la realan mondon, baldaŭ vi enspiros puran aeron, baldaŭ vi rektigos viajn ŝultrojn, baldaŭ vi varmiĝos sub la karesa suno. La viro impetis hejmen por preni fosilon, revenis kaj komencis fosi la kavon. La viro fosis dum unu tago, fosis dum la dua, falis sur la teron plurfoje senfortiĝinta, sed kiam li aŭdis pezan ĝemadon de la Nigra Bagnulo, li estis forgesinta tuj pri sia laciĝo kaj denove okupiĝis pri sia laboro. Ankaŭ la Nigra Bagnulo fosbatis la malmolan teron de sia flanko. Ili fordonis multajn fortojn al tiu laboro, multajn tagojn, kaj finfine ili penetris tra la tero unu al la alia. La viro kaptis nigran maldikan manon, kiu aperis el sub la tero kaj tiris ĝin al si. Li eltiris finfine la Nigran Bagnulon el lia infero. La viro ĝojis kvazaŭ etulo, purigis de la abomeninda tero la Nigran Bagnulon, donis akvon por li satrinki, donis panon por li satmanĝi. Ili sidiĝis proksime al la kavo apud la arbo, la viro deziregis montri al la Nigra Bagnulo la veran mondon, kiun tiu eĉ ne memoris, deziregis rakonti, kio tie okazas.

— Ho, kia agrabla freŝa venteto — diris la viro al la Nigra Bagnulo — la vetero ŝanĝiĝas, baldaŭ pluvos iomete.

— Ĝi estas agrabla, sed ne tre, — respondis la Nigra Bagnulo ŝrumpante, — ĵus estis varme, nun estas jam malvarmete, tro rapide ĉio ŝanĝas ĉi tie ĉe vi sur la tero. Sed ĉe mi sub la tero la temperaturo estas ĉiam la sama, tie vi ne ŝvitos kaj ne frostiĝos, ne estas surprizoj por vi, ĉio estas simpla kaj komprenebla.

— Rigardu la ĉielon, kia beleco! — la viro montris la ĉielarkon, kiu aperis post la pluvo.

— Kia ajn beleco estu, sed mi ne tre volas rigardi la ĉielon, ĉio estas tiel hela kaj blindiga ĉi tie, ke mi miras, kiel homoj ankoraŭ ne perdis la vidkapablon pro ĉio ĉi. Miaj okuloj doloras pro via hela lumo. Sed ĉe mi sub la tero ĉio alias, ekzistas nenio por rigardi

foren, oni ne bezonas streĉi la vidkapablon. Mi havas mian laboron antaŭ mi, do mi rigardas ĝin.

Ankaŭ ĉi-foje la viro diris nenion, kaj poste li denove ripetis sian parolon:

— Rigardu, kiaj belaj floroj kreskas ĉirkaŭ vi, kliniĝu kaj flaru. Mi certas, ke vi ne flaris tiajn odorojn dum longa tempo.

— Ho ne, dankon, mi flaras eĉ sen kliniĝo, ĝi estas tro akra por mi. Sed ĉe mi sub la tero ne ekzistas tiaj akraj odoroj, la tero kaj ŝtono ĉiam odoras same, mi alkutimiĝis nur al ĉi tiuodoro.

Kaj la viro denove miris pri la vortoj de la Nigra Bagnulo, sed nur levis siajn ŝultrojn.

— Jen prenu ĉi tiujn novajn vestojn kaj alivestiĝu, kaj poste ni iros pli malproksimen kaj mi montros al vi ankoraŭ pli grandajn belaĵojn de ĉi tiu tero — la viro donis al li la vestojn.



ilustraĵo de Oleh Loburak

La Nigra Bagnulo vestis sin, sed anstataŭ sekvi la viron, li denove sidiĝis apud la arbo.

— Kio okazis, — la viro demandis, — kial vi ne sekvas min?

— Viaj novaj vestoj estas tre malkomfortaj por mi, bonfarulo mia — la Nigra Bagnulo respondis sulkiginte la vizaĝon, — ili estas malvastaj kaj frotas mian haŭton. Tamen miaj ĉifonoj, kvankam ili estas malbelaj, estis malpezaj kaj malstrikaj, mi bone dormis kaj laboris en ili.

— Ne gravas, vi kutimiĝos al la novaj vestoj. Kaj al nia lando vi tute ne bezonas alkutimiĝi, ĝi estas belega kaj favora por ĉiu homo. Vi havis grandan bonŝancon trovi bonan vojon sur la surfacon kaj vi ne plu estas la Nigra Bagnulo, ne, nun vi estas homo. Nur

atendu — mi kuros kaj portos por vi bonajn ŝuojn, ni povos iri tre malproksimen kun vi por rigardi aliajn landojn, por ke vi vidu plene la belecon de la tero, ŝatu plene vian liberon.

La viro impetis hejmen por preni ŝuojn kaj revenis jam post momento, sed li jam ne trovis la Nigran Bagnulon apud la arbo. La viro ne komprenis, kien li estis malaperinta, do li iradis kun tiuj ŝuoj en la manoj kaj vokis lin ĉien kaj kriis, sed la Nigra Bagnulo ne respondis. La viro ĉesis voki lin, nur kiam li revenis al la kavo, al tiu, el kiu li eltiris lin. Apud la freŝe fosita tero kuŝis la novaj vestoj de la Nigra Bagnulo.

Elukrainigis



Petro Palivoda

(Ukrainio)

Guram Svanidze

Delikata temo

Reĝisoro de Teatro de Juna Spektanto vizitis redaktejon al ni. Foje en fino de labortago li alportis materialon. Mi komencis korekti. En tiu tempo de alia flanko de koridoro aŭdiĝis ridego.

– Kunlaborantoj amuziĝas, – mi rimarkis.

– Mi povas supozi, pri kio ili parolas. Ĉu pri seksaj temoj? – li demandis.

– Kiel vi konjektis?

– En ilia rido estas specifa dusencaĵo. Tiel virgulinaj reagis, kiam viroj parolas pri io maldeca. Junulinoj kvazaŭ protestas kaj samtempe volas aŭskulti tion.

Mi distriĝis de manuskripto kaj fiksaŭskultis. Post ioma tempo mi redonis al la gasto manuskripton. Reĝisoro ĉagreniĝis, kiam li ekvidis, kion mi faris kun lia materialo. En koridoro aŭdiĝis ridego. Li rimarkis:

– Ili ridas kiel adolesko-huliganoj.

Ĉefo en tiu kompanio estis Igorj K. Li havis bonan karieron, estis edziĝinta, sed li tre ŝatas paroli pri delikataj temoj. Lia rigardo

estis skananta, rideto estis cinika. Estus pli bone, se li estus ĵurnalisto de iu fiĵurnalo.

– Vi neniel moderiĝis, – mi rimarkis al li.

– Sed vi iĝas simila al Simaĥa Rabinoviĉ. Vi estas sama homevitema kaj neamanto de seksaj temoj, – li respondis.

Li parolis pri blindeta maljunulo. La maljunulo laboris nur por honorarioj, estis neafabla kaj, verŝajne, jam forgesis, kion signifas sekso.

En alia fojo Igorj komparis min kun mia ĉefo Velimir B.

– Li estas rukto de stalina tempo. La tedanto. Burĝa vorto “sekso” teruras lin, – la kolego mokis.

Kaj poste diris:

– Ni ĉi tie devas efektiviĝi politikon de komunista partio!

Li imitis kolegon Kirill Kirilloviĉ, malgranda malsanema viro, nia redaktoro. Lia voĉo estis raŭka kaj malforta.

Virinan temon en tiu kompanio gvidis Luiza, vigla ĵurnalistino. Estas tia rolo, kiam virinajn ĉarmojn oni uzas kiel daŭrigon de profesiaj kvalitoj. Ŝi parolis glate kaj grave, ne ekzalte jelpis, kiel iuj el junulinoj, kiuj nur almezuris ŝian rolon. Ili sakris, sed virinece, ne vulgare. Estis tia modo.

Foje Luiza intervjuis unu faman scienciston. Li ankaŭ estis bofilo de granda partia ĉefo.

– Kia li estas solida! – diris pri li unu juna ĵurnalistino pririgardante foton de li en ĵurnala paĝo.

– Li estas tipa gejo! – malvarme respondis la leonino. Neniu demandis pri pruvoj.

En tiu tago ŝi ankoraŭ klarigis al junularo komplikan vorton “servilismo¹”. Ŝi sciis multajn tiajn vortojn.

Pro ŝia emo al pikanta speco de sekso ŝercis nur Igorj. Oni observis ofican disciplinon. Nur juna kunlaboranto Arkadij provis rompi la disciplinon. Li koketis per sia Hollywood²-a rideto. Kiam li parolis, li

fiksaŭskultis sian voĉon. La voĉo plaĉis al li. Oni sciis, ke liaj gepatroj estis invalidoj, surdamutuloj. Foje li malprosperis “ŝercis” – provis kisi kolegon Luiza al lipoj... Responde Luiza atentigis al li lian genetikan neplenalvalorecon ankaŭ en ŝerca formo.

Iufoje mi vizitis tiun kompanion, kutime kiam ili drinkis bieron. Foje ili decidis rakonti anekdotojn, provis fiksi “dekon de plej maldecaj anekdotoj”. En iu momento mi decidis, ke mi ne venkos kolegon Arkadij en tiu konkuro. Li rakontis ian aĉaĵon pri Romeo kaj Julieta. Poste venis mia vico. Post mia anekdoto la multaj el tiu kompanio misglutis pro rido. “Efektive, tio estas adoleska nivelo,” – mi pensis.

Mi ne scias, kia diablo enloĝiĝis en ili. Oni parolas, ke tiaj “fikompanioj” en diversaj formoj aperas ĉie, kie homoj kolektiĝas en grupoj. Dise tiuj “ŝerculoj” estas ĉarmaj kaj inteligenciaj homoj. Kaj estas neniam intrigoj.

Al mi ŝajnis, ke Freŭdo povus klarigi, pro kio tiel okazas. Foje en redakcejo iris Gena R., fama fotokorespondanto kaj ĉi-loka donĵuano. Li laboris en centra moskva ĵurnalo. Tuta kompanio, viroj kaj virinoj, elsaltis el siaj kabinetoj. Ili humileme rigardis tiun gaston. Li staris kaj rigardis ĉiujn de alteco de sia staturon. Li radiis masklecon.

Cetera amuzoj en tiu fikompanio ne ĉiam estis neofendaj. Igorj havis “ĉarman” kutimon: kiam ĉe li okazis ia amafero, li tuj rakontis pri tio al ĉiuj. Iufoje li kolektis ĉirkaŭ si kolegojn kaj telefonis al edzo-kokrito – teatre kaj detale li rakontis al la kokrito pri specifikecoj de korpo de lia edzino. Spektantoj estis kontentaj.

Igorj neniam estis batita pro tiaj agoj. Li sciis, la ruzulo, kun edzinoj de tiaj malfortuloj aranĝi amajn aventurojn. Sed suferis Ljova, ĉiamulo de tiu kompanio. Foje li havis amaferon kun fama ĵurnalistino. Li venis al ŝia loĝejo kaj uzinte malĉeeston de mastrino tralegis ŝiajn intimajn leterojn de diversaj viroj.

– Mi ne havis okupon, pro tio mi fosis en skriba tablo, – poste Ljova rakontis.

Li ne havis imagkapablon kaj konsterniĝis pro artificeco de enhavo de tiuj leteroj. Li estis tiel konsternita, ke li tuj rakontis pri tiu korespondado de sia amorantino.

– Kiam Tanja amoras, do tiaj pozoj ne estas eĉ en “Kamasutra³”, – Ljova mokis.

Tanja havis severan karakteron. Kiam ŝi eksciis pri klaĉoj, kiujn disvastigis ŝia amoranto, ŝi speciale venis en redakcejo kaj kaptis lin. Oni devas vidi, kiel tiu furioza personino ĵetis sin al ofendinto. Li estis estinta boksisto, lerte deflankiĝis de ŝi. Poste tedis al li deflankiĝi, kaj li provis forkuri. Tanja ĵetis sin kuratinge.

Tiuj kolegoj, kiuj estis pli solidaj, ne interesiĝis pri tiu petolo aŭ ŝajnigis, ke ili ne interesiĝas. Ekzemple Simĥa Rabinoviĉ tute ne rimarkis tiun kompanion. Sed kuriozaĵo okazis kun Velimir B. Des pli ke okazis sangverŝo.

... En redakcejo aperis staĝanto Sergej Gaj, kiu laboris kun Velimir. Kompanio ekzumis kiel abelaro, ektumultis, perdis trankvilecon. Afero estis en tio, ke la staĝanto havis nekredblan belan ĉarman aspekton. Li similis pupeton kun okuloj de miela koloro, kun ruĝa hararo. Pro scivolemo tiu kompanio urĝe ekvolis scii lian seksan preferon. La knabo konsciis sian atakeblecon, tial li ĉiel penis ne doni motivon al malĝustaj juĝoj. Li speciale parolis per baso, konstante manipulis virajn akcesoraĵojn: turnis fajrilon, longe tenis en mano cigaredon por poste ekfumi. Arkadij turmentis lin per ŝercoj kaj mokoĵoj. Arkadij estis volonta turmentanto de diversaj “stultuloj”, gejoj kaj malsukcesuloj. Tiu aroganto sciis, ke signoj ne estas. Li parolis, ke rido senmaskigis gejojn – gejoj havas virinan ridon. Sed Sergej sensone ridis – bloviĝis, ĉar ne ellasis aeron, ruĝiĝis kaj tremis. “Li misformiĝis,” – kiel iu rimarkis. Arkadij ankaŭ diris, ke oni povas distingi

